

DECEMBRO 2009



MIRMEKOBO 7

# TABELO DE ENHAVO

<b>RECENZO:</b> <i>Ilustrita enciklopedio de hejmaj mamuloj</i> Red. Nikolao Gudskov; Rec. Tatjana Auderskaja.....	3
<b>MIRAKLA KOMPUTILO</b> ( <i>ŝerco</i> ) de Viglo .....	4
<b>KURIOZA HISTORIAĴO</b> <i>Insulo de Rozoj</i> , de Viglo .....	5
<b>ENIGMOJ</b> de Viglo .....	7
<b>HISTORIO DE LA PRESARTO</b> ( <i>parto 2</i> ) de D. Broadribb .....	8
<b>NIA ARTISTO</b> Julian Beever .....	14
<b>ANEKDOTO</b> <i>Diablo kaj Sankta Savao</i> , de Jadranka Miric .....	23
<b>SOLVO DE LA ENIGMOJ</b> .....	25
<b>RAKONTO</b> <i>Vizitanto</i> , de Donald Broadribb .....	26
<i>Fotoj de la besto mirmekobo</i> .....	30

*Mirmekobo* estas neregule aperanta retrevuo, havebla nur elektronike. Ĝi estas redaktata kaj enretigata en Aŭstralio, kaj celas interesajn legantojn ĉie en la mondo. Ni bonvenigas verkojn por estontaj numeroj de *Mirmekobo*.

Ankoraŭ haveblas ĉiuj antaŭaj numeroj de *Mirmekobo*:

Numero 1: aprilo 2008

Numero 2: junio 2008

Numero 3: februaro 2009

Numero 4: aprilo 2009

Numero 5: junio 2009

Numero 6: sepembro 2009

elŝuteblaj ĉe [http://web.me.com/donbroadribb1/donbroadribb1\\_Mirmekobo/](http://web.me.com/donbroadribb1/donbroadribb1_Mirmekobo/) kaj  
ankaŭ ĉe <http://www.gazetejo.org/mirmekobo>.

Anticipata aperdato de numero 8: marto 2010

Adreso de la redakcio:  
[mirmekobo@mac.com](mailto:mirmekobo@mac.com)

# RECENZO

## KOLOSA LABORO

*Ilustrita enciklopedio de hejmaj mamuloj* red. Nikolao Gudskov  
recenzas Tatjana Auderskaja, biologo [Rusio]

La Moskva eldonejo "Impeto" eldonis novan eron en la serio "Familia biblioteko". Tio estas "Ilustrita enciklopedio de hejmaj mamuloj"; Moskvo: Impeto, 2008, 240 paĝoj, ISBN 978-5-7161-091-3.

Kompilis tiun libron Nikolao Gudskov, kiu estas biologo laŭ profesia klero. Jen altnivele verkita scienc-populara libro, liveranta perfekte aŭtentajn sciojn pri ĉ. 50 specioj de diversaj mamuloj, de katoj ĝis kojpoj, de pinglomoj ĝis elefantoj.

Por ĉiu besto estas priskribita la historio de ĝiaj genro kaj specio, ekstera aspekto (kun precizaj korpodimensioj), skizo de la karakteriza por la besto konduto, rekomendoj pri konvenaj kondiĉoj de hejma tenado: kaĝo, manĝaĵo, temperatura kaj luma reĝimoj, bredado ktp. Priskribon de ĉiu specio akompanas bildeto, kiu montras la prezentatan beston en ĝia natura medio. Krome, la plej ampleksaj ĉapitroj, tiuj pri katoj kaj hundoj, estas liveritaj kun enhavoriĉaj rakontoj kun scivolindaj faktoj kaj bildoj, kiuj temas pri historio, sensoj, konduto, reproduktiĝo ktp, kaj ankaŭ utilaj informoj pri dresado, tenado de idoj kaj plenkreskaj bestoj, kaj eĉ informo pri internaciaj bredistaj asocioj. Kaj foj-foje, kiel piednotoj, aperas spritaj kaj trafaj rimarkoj de la aŭtoro pri tiu aŭ alia temo.

Do, la libron oni povas legi ne nur kiel informilon, sed simple kiel interesan legaĵon, incantan onin al la mirinda mondo de vivaj estaĵoj. Ja ĝuste tia devas esti bona scienc-populara libro: interesveka, kaŭzanta pli profundan komprenon kaj eĉ amon al sia objekto. Ne lastas ankaŭ la lingvaĵo: ĝi devas esti simpla kaj klara. Nu, la aŭtoro certe plenumas tiun kondiĉon; sed gravas, ke en la libro per tiu facila lingvaĵo estas donata pure scienca informo. En la prefaco la aŭtoro klarigas sian elekton de specialaj terminoj, kio en si mem estas sufiĉe malfacila kaj komplika afero, konsiderante nian ne tre evoluintan zoologian nomenklaturon. Ofte la bezonata vorto eĉ tute ne ekzistas, kaj tiam la aŭtoro mem devas inventi kaj proponi ĝin. Ni supozas, ke la pridiskutata libro alportos sian kontribuon ankaŭ al tiu pure scienca branĉo de speciala nomenklaturon.


Sed se paroli pri laikoj, simplaj posedantoj de diversaj hejmaj bestoj, por kiuj estas destinita tiu ĉi libro, same kiel aliaj libroj de la serio "familia biblioteko", do por ili utilos, krom specifaj donitaĵoj, ankaŭ ĝeneralaj ĉapitroj: "Kiaj mamuloj loĝas en hejmoj kaj kiel elekti hejman dorlotbeston", "Zorgado pri hejmaj mamuloj", "Transportado", "Zoohigieno", "Nutraĵo", "Koprofagio",

"Malsanoj kaj kuraco" ktp. Kolosa laboro estis farita por trovi tiujn dise lokitajn informojn kaj krei el ili klaran kaj koncizan tekston. Pro tio la libro povas servi al ajna bestposedanto, kiu trovos en ĝi amason da utila informo.

En la fino de la libro troviĝas "Kvinlingva [sed fakte 6-lingva!] listo de bestnomoj kaj taksonomiaj unuoj" en la lingvoj esperanto, latina (scienca), angla, franca, germana kaj rusa. Tiu indekso faras la libron facile uzebla por ajnalingvano, ĉu profesia biologo, ĉu simple bestamanto.

Sur la lastaj paĝoj troviĝas Tabelo de karakterizaj trajtoj de la priskribitaj specioj, kiu enhavas, i.a. , kariotipon, dentan formulon, longecon de la korpo kaj de la vosto, vivodaŭron, averaĝan kvanton da idoj kaj gravedperiodon. Tiuj donitaĵoj estas dismetitaj en pluraj sciencaj fontoj, kaj kunigi ilin kaj ordigi en klara komprenebla tabelo ankaŭ estas merito de la aŭtoro.

Kaj fine — pri la aspekto de la libro. Ĝi estas eldonita en 2008 de la Moskva eldonejo "Impeto" en la serio "familia biblioteko". Eldonado de tiu serio komenciĝis en 2007 per *Ilustrita enciklopedio de akvariaj fiŝoj*. Ambaŭ libroj estis eldonitaj tre zorgeme, sen eraroj (kio tre maloftas!), sur bona blanka papero, kun multaj nigra-blankaj bildetoj ene kaj koloraj sur duonmola kovrilo. La libroj aspektas alloge kaj indas librobretojn de ĉiuj leg- kaj best-amantoj.



## MIRAKLA KOMPUTILO

de Viglo [Italio]

Josefo sin gloras pro aĉeto de super-komputilo, kiu kapablas ekzakte respondi pri ĉio, pri iu ajn demando. Do, diras li al sia amiko Viktor: "Provu demandi ĝin pri io, pri io ajn". La amiko sin lokas ĉe l' klavaro kaj fingrumas la jenon: "Kie estas ĉimomente mia patro?" Tuj la komputilo reagis per ekrana respondo: "Li estas fiŝkaptanta ĉe Lago Eyre." Viktor sin turnas al la amiko dirante: "Oni trompis vin! Mia patro mortis antaŭ 5 jaroj!!!" Tute ĉagrenita Josefo balbutas: "Ne eblas eraro ... ĝi estas garantiita...!" kaj aldonas: "Eble, tekstigu la demandon alimaniere ...". Tiam la amiko tajpas: "Kie estas ĉimomente la edzo de mia patrino?" Tujuje la komputilo respondas: "La edzo de via patrino mortis antaŭ 5 jaroj. Sed via patro estas fiŝkaptanta ĉe Lago Eyre!!"

# KURIOZA HISTORIAĴO

## INSULO DE LA ROZOJ, SENDEPENDA RESPUBLIKO ESPERANTISTA

de Viglo [Italio]

*Revolucia historio daŭrinta nur 55 tagojn, malmulte konata: granda neplenumita ideo, eĉ nun ravanta pro siaj strangaj kaj misteraj rilatoj.*

*La 1-an de majo 1968.*



En Adriatiko, antaŭstrande de la urbo Rimini, tuj ekstere de la teritoria marlimo, la bolonja inĝeniero Georgo Rosa proklamas la sendependecon de mikronacio sur la fera platformo, kiun li mem projektis kaj konstruis. Tiel naskiĝas la “Respubliko de la Insulo de la Rozoj” laŭ la nomo en esperanto, oficiala



lingvo de la ĵusnaskita ŝtato, kaj li eĉ nomumas “ambasadoro”-n, inĝeniero Rudy Wolfgang Neumann, germana entreprenisto.

Tujtuje la mikronacio fariĝas afero nacia kaj internacia, estigante kaj egajn timojn kaj esperojn, revojn. Politikuloj samkiel aŭtoritatoj ektimas pro estiĝo de nova internacia “ŝtato” kelkakilometre antaŭ la itala marbordo. Ekstaras enketoj, prezentiĝas parlamentaj demandoj: iu vidas malantaŭ la Insulo de la Rozoj la ombbron de fremda nacio — memoru la daŭran etoson de la Malvarma Milito; aliuloj ektimas starigon de kazino, kun hazardludoj kaj logistinoj, atenco al moralo: fakte dum la jaro 1968 okazis en okcidenta Eŭropo sociaj tumultoj, precipe studentaj.

Aliflanke la turismaj entreprenistoj, samkiel la administrantoj de la urbo Rimini, favore taksas la “Insulo”-n, fariĝintan neantaŭvidebla turisma allogaĵo: la somergastoj viciĝas por akiri lokon sur boatoj kiuj ĉirkaŭnavigas la platformon, kaj preskaŭ freneze aĉetas la poŝtmarkojn de la nova ŝtato, kiel originalan ferian memorigilon.



Eĉ UEA entuziasme aplaŭdas la iniciaton, ĉar la nova ŝtato adoptis, kiel oficialan, la lingvon internacian. Krome la “Insulo” fariĝas somera

novaĵo por presagentejoj, ĵurnaloj, revuoj kun raportaĵoj, enketoj, intervjuoj kaj fotoj de belegaj junulinoj bikine senvestaj.

Post 55 tagoj de la sendependa proklamo, la itala Ŝtato decidis firman intervenon. La insulo embargiĝas, kun sekva militista okupado. Poste sur la platformon elŝipiĝas mararmeaj eksplodistoj: persone mi konatiĝis kun “karabenisto”<sup>1</sup>, kiu dum ses monatoj estis inter la okupantoj de la platformo.

*La 25-an de februaro 1969* la maro englutas la insulon.

De tempo al tempo tiu evento de la “Insulo de la Rozoj” unuarangiĝas. Bando de romanaj muzikistoj inspiriĝis per la historio de la platformo por “hip-hop”-a peco, kiu gajnis en festivalo.

Somere en 2008 Vankuvera Muzeo en Kanado starigas instalaĵon festantan la eventon, ankaŭ rilate la insulon “Utopia” de la filozofo Thomas More<sup>2</sup>. Pri la historio publikiĝis eĉ bildstria albumo. La pasintan 1-an de julio, en Rimini okazis premiero de la kulturfilmo “Insulo de la Rozoj — La libero timigas”, rezulto de unujara esplorlaboro kaj 40 horoj de filmado.

Sed la “Insulo de la Rozoj” ne estas la ununura mikronacio en la mondo. En la Norda Maro staras “Princolando de Sealand”, same sur platformo, unu el la pluraj konstruitaj dum la 2-a Mondmilito cele al defendo kontraŭ aviadilaj kaj misilaj (la famaj V2) atakoj al Londono. Tiu ĉi princolando ne pereis kaj eĉ nuntempe bone funkcias kiel turisma loko. Pliajn informojn donas la retejo: <http://www.sealandgov.org/history.html>.

Do, la ideo de inĝeniero Georgo Rosa ne estis tro ekstravaganca: ĝi nur anticipis la nuntempe surmarajn konstruadojn de hotelo en Dubai kaj de japana flughaveno. Kaj nun, pli ol okdekjarulo, li prave povas orgojli eĉ se, pripense la tutan historion, amara rideto aperas sur lia vizaĝo.



Flago de Insulo de la Rozoj

<sup>1</sup> “Karabenisto”, militista fako starigita en 1814 fare de reĝo Viktoro Emanuelo la 1-a el la domo Savoja. Ekde 1861 ĝi partoprenas en la itala armeo kaj nuntempe funkcias kiel civila, militara kaj juĝa polico, flanke de tiu de la ŝtato.

<sup>2</sup> *Of the Best State of a Republic, and of the New Island Utopia*, verko de Thomas More, 1516.

# ENIGMOJ

de Viglo [Italio]

(Solvaj sur paĝo 25)

## Aĝo de Manuĉelo

Hodiaŭ Manuĉelo havas trioble la aĝon de sia frato Daniĉelo. Post tri jaroj li nur havos duoble la aĝon de Daniĉelo. Post kiom da jaroj Daniĉelo havos la aĝon, kiun Manuĉelo nun havas?

## CERBOTIKLILO

Trovu ciferojn

5638275 ↘  
4 → 9  
2 → 76  
8739254 ↗  
2526348 ↘  
5 → 6

Laŭ la supraj 3 elzemploj kaj determinonta logika kriterio, trovu la nombrojn, kiuj devas anstataŭi la demando-signojn:

? → 64  
4937261 ↗  
6224482 ↘  
2 → ?

## DUSENCAĴO

Trovu vorton, kiu havas du malsamajn signifojn.

Interkrampe: la liternombro

Fortega naneto !! ( 2 )

Ne nur harmoniigas  
sonoraĉan aron,  
sed krome difinas  
paroladeron.




# HISTORIO DE LA PRESARTO

de Donald Broadribb


## Gutenberg

Johannes Gensfleisch zur Laden zum Gutenberg (ĉ. 1398 – Februaro 1468) naskiĝis en Mainz. Pri lia frua vivo ni scias nenion. Sed laŭ letero lia en la jaro 1437, ŝajnas ke li profesiis kiel or-juvelisto. Ĉirkaŭ la jaro 1438 li provis presadon per lignaj presliteroj. En 1449 aŭ 1450 li partneriĝis kun Johannes Fust, orajisto, kiu prutedonis monon por konstrui presaparaton. Peter Schöffer, profesia skribisto el Parizo, asistis Gutenbergon. Gutenberg presis kelkajn verkojn, inkluzive de miloj da indulgencfolioj por la katolika eklezio en 1454-1455. Samtempe, pruntepreninte pli da mono, li komencis komposti la latinan tekston de la Biblio. Li presis proksimume 180 ekzemplerojn. El ili, 48 ankoraŭ ekzistas — kelkaj estas kompletaj, aliaj ne.



Gutenberg baldaŭ decidis ke basreliefe ĉizitaj lignaj literoj ne adekvatas por sia projekto, do li pretigis metalajn literojn, uzante molmetalajn matricojn en kiujn li verŝis fanditan metalon.

La plano de Gutenberg estis presi libron kiu kiel eble plej ekzakte similis al la manskribitaj manuskriptoj ĝis tiam uzataj. Tiucele li faris plurajn muldilojn de diversaj literoj, por ke la presitaj formoj de litero ne aspektu identaj. Inkluzive de interpunkciaj signoj, kaj specialaj signoj kutimaj en la ĝistiana manuskripta tradicio, do, necesis ke li produktu pli ol tricent signojn por sia kompostado. Ĉi-dekstre vi vidas (en malgrandigita formo) la unuajn liniojn de la unua paĝo de la biblia teksto de li presita.<sup>1</sup> La literoj aspektas strangaj. Ili diras **Incipit liber bresith quē nos genesim** — “Incipit liber bresith quō nos genesim”, pli-malpli “Komenco de la libro bresith kiun ni [nomas] Genezo” [*Bresith* estas la hebrea nomo de la libro Genezo.] La dua linio de la teksto estas la unuaj vortoj de la latina bibliversio. La presita teksto estas permane korektita kelkloke.




<sup>1</sup> Foto de origina eldono konservata en muzeo de Universitato de Texas. La teksto kompostita kaj presita de Gutenberg enhavis erarojn permane korektendajn...



Kiel Gutenberg sukcesis presi la unuan linion per ruĝa koloro? Li tion ne faris. Li lasis blankan spacon tiuloke kaj koloristo permane skribis ruĝe la literojn, laŭ mendo de aĉetanto, kiel ankaŭ ruĝajn kaj blujajn dekoraciojn de diversaj literoj.


Laŭ la manuskripta tradicio, tutaj paĝoj estis arte beligitaj, ankoraŭ laŭ speciala mendo de la aĉetanto. Jen la kompleta unua paĝo de Genezo en unu el la presitaj ekzempleroj (tiu nun posedata de Universitato de Texas):



La kadro ne estis presebla, do devis esti aldonita permane, kaj kolorita. Tial neniuj du ekzempleroj de la eldonaĵo estis tute samaspektaj. Same rilate al multaj koloritaj literoj, kiujn oni devis permane kolori. La dekoracio estis tre bele farita. Jen alia ekzemplo, ĉi tiu estis farita en Anglio.



Kiel rektigi la dekstran marĝenon de presaĵo? La sistemo uzita daŭris ĝis la mezo de la dudeka jarcento: oni faris pseŭdoliterojn, t.e. nudajn stangojn sur kies finaĵo estis neniuj signoj, kaj metis ilin laŭbezone inter vortojn:



La larĝo de la sensignaj stangoj variis, tiel ke eblis enmeti ĝuste sufiĉe da ili por movi la literaron preskaŭ precize al la dekstra marĝeno.

Pro la granda nombro da literoj bezonaj por unu paĝo, Gutenberg kompostis unu paĝon, kaj ŝmirinte inkon sur la metalajn literojn li premis paperfoliojn sur ĝin, kaj faris tion per ĉ.200 paperfolioj. Post tio, li elprenis la individuajn literojn kaj remetis ilin laŭ alfabeto ordo en lignan keston. Farinte tion, li komencis komposti la duan paĝon, kaj ripetis tiun procedon ĝis la tuta libro estis presita (=unu ĝis du jaroj da laboro).

Ĉu ankaŭ bindita? Neniel. La aĉetinto devis mem bindigi sian ekzempleron, kutime en du aŭ tri volumoj.

### *Post Gutenberg*

Strange estas ke post la tempo de Gutenberg, neniuj grava progreso en la presarto okazis dum pli ol kvar jarcentoj. La desegno de la literoj pliklariĝis, la asistito de Gutenberg, Peter Schöffer, mem desegnis kaj uzis novajn metalajn tipojn, kaj de tiam plurmil variantoj de la presalfabeto prepariĝis. Ankoraŭ neniuj komputila tiparo kun ĉiuj ĉ.300 variantaj literformoj uzitaj de Gutenberg estas farita, kvankam pluraj ekspertoj malrapide klopodas krei tian.


Oni strebis fari kompostmaŝinon multfoje dum la jarcentoj post Gutenberg,

sed neniu sukcesa tia maŝino estis inventita, ĝis Ottmar Mergenthaler en 1886 sukcesis fabriki linotipan maŝinon, kiu estis unue uzita por presi *New York Times* en tiu jaro. Tiu maŝino havis klavaron similan al tiu poste uzita por tajpiloj. En la giganta maŝino estis muldiloj por la literoj de la alfabeto, plus interpunkciaj signoj. Kiam la uzanto premis klavon, la maŝino verŝis fanditan metalon en la muldilon, kaj kiam la uzanto premis ĉiujn klavojn por unu linio da teksto, la maŝino produktis solidan metalan blokon. Tiu bloko eniris tenilon, kiu firme tenis ĝin kaj sekvajn literojn.



La linotipa maŝino (1886)

En 1896 Tolbert Lanston enkondukis monotipan maŝinon:



La monotipa maŝino 1896

Kvankam la linotipilo multe populariĝis, ĝi havis gravan malavantaĝon: por korekti eraron en la teksto de linio, necesis elpreni tutan metalan linion kaj ĝin rekomposti. La monotipilo faris unuopajn literojn, do korektoj pli facilis, sed la kunmeto de la literoj por formi paĝon da teksto estis multe pli laborpostula. Tial, linotipoj estis multe preferataj por komposti ĵurnalojn kaj nealkvalitan paĝaron por libropresado.

Farinte kompostitan paĝaron, necesas presi tiun tekston. La sistemo uzita de Gutenberg estis tre malrapida, kaj facilis ruini presatan paperfolion, per eta moviĝo de la papero dum oni premis ĝin sur la metalan literaron, aŭ dum oni deprenis ĝin.

En postaj jaroj oni faris diversajn tenilojn por eviti gliton de la paperfolioj, tamen la problemo presi kolorojn restis nesolvita. Por presi nigra-blankan bildon solvo estis relative facila. Oni gravuris la bildon sur metala plako kaj uzis tion anstataŭ literaron por la presado. Sur malbonkvalita papero, kia estas uzata por ĵurnaloj, la bildoj nebele aspektis. Do por bonklasaj magazinoj oni uzis pli altkvalitan paperon, kio kompreneble multe pligrandigis la koston. Kiam oni presis bonkvalitajn librojn, oni presis la bildojn sur bonkvalita papero kaj engluis la bildopaĝojn kiam oni bindis la libro-ekzemplerojn.

Kelkaj tre talentaj artistoj lernis literumi simile al la aspekto de literoj en spegulo, kaj gravuris kaj bildojn kaj vortojn sur metala plako, por povi uzi kaj vortojn kaj bildojn sur sama paĝo. Unu eksperta kaj talentega artisto tia estis William Blake (1757-1827), kiu tiel presis mem siajn verkojn kaj post la presado zorge koloris la bildojn permane. Li presis siajn librojn laŭmende, t.e., kiam oni mendis ekzempleron, ricevinte la mendon li presis tiun ekzempleron, koloris la bildojn, kaj sendis la libron al la mendinto.

Por amase presi kolorajn bildojn necesis fari gravuritajn lignajn aŭ metalajn blokojn, kaj kvarfoje presi ĉiun paperfolion, ĉiufoje por aparta koloro (blua, ruĝa, flava, nigra). La rezultoj estis ne tre bonaj, sed zorge farite ili estis akcepteblaj. Tamen tute precize loki la folion ĉiufoje estis malfacile, kaj necesis detruigi grandan procenton de la fuŝitaj folioj.


Ankoraŭ nun ne eblas presi bildon kolore identan kun la originala pentrita bildo, kvankam akcepteble proksimume-koloraj reproduktaj eblas.

Sur la sekva paĝo estas reprodukto de unu el la gravuritaj kaj mankoloritaj paĝoj presitaj de William Blake.

Portreto de  
William Blake







[Fino de la artikolo.]


# NIA ARTISTO

## Julian Beever

Julian Beever estas brito, kiu konigis sin kiel lertegan pavimartiston. Per kreto li faras okultrompajn bildiluziojn ne nur en Eŭropo, sed ankaŭ en la Amerikoj, Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Post prezento de nur malgranda nombro el liaj centoj da pavimbildoj, ni montros kelkajn fotojn de lia preparo de la bildoj.

















*La pretigo de la ĉisupra bildo:*

La pretigo de tiaj pavimbildoj estas longedaŭra. Julian Beaver komencas per simpla kreta skizo, kiun li ellaboras por indiki precize kion li celas:















# FABELO

## Diablo kaj Sankta Savao

Fabelo por dramludo

Serba popola fabelo. Adaptita de Jadranka Miric [Serbio]

Sur scenejo videblas Sankta Savao piediranta monton. Liadirekten iras Diablo. Ĝus vidinte la sanktulon Diablo ektimis, provis sin kaŝi, sed malsukcese. Do, ili renkontiĝis survoje.

Sankta Savao diras: “Dio helpu al vi!”

Diablo malice respondis: “Ĉu vi zorgas pri tio?”

Sanktulo: “Kiel vi fartas?”

Diablo respondas kolere: “Ĉu vi vere zorgas pri tio?”

Sanktulo pace demandas lin: “Kien vi iras?”

Diablo daŭre kolere respondas: “Nek pri tio vi estu zorgema!”

Sanktulo diras: “Kion vi faras?” — per milda voĉo provis li senkolerigi Diablon.

Diablo, ĉifoje iom suspekta, diras: “Eble, se mi havus ion da kamparo mi okupiĝus pri legomkulturado.”

Tiam Sanktulo proponas al Diablo: “Bone, vi elektu min kiel kompanion. Ni kunlaboros. Ni interkonsentos kion ni semos, kion kulturos, kion ni rikoltos.”

Diablo denove kolere respondas: “Ho, estas klare ke vi min malestimas. Mi volas ke ni subskribu kontrakton inter ni.”

Sanktulo kapjesas kaj ili eksubskribas la kontrakton.

Sanktulo saĝe proponas: “Unue, ni semos cepojn! Kiam la cepoj elkreskos kion vi elektos: tion kio kreskas subtere, aŭ super la tero?”

Diablo diras gaje, frotante siajn manojn: “Kompreneble tion kio kreskas super la tero, belegajn verdaĵojn.”

Sanktulo diras senriproĉe: “Bone, vi mem elektis. Poste nek serĉu de mi pardonon, nek mi volas aŭdi plendadon! Vi scias ke post semado devas pasi kelkaj monatoj por rikolti kion ni semis.”

Diablo kolere respondas: “Mi diris kion mi elektos, sed mi suspektas, verdire, ke vi min trompis. Ja, belegaj verdaĵoj velkos. Restos cepo subtere, ĉu ne?”

Sanktulo ridete respondas: “Jes, sed vi pripensu pli bone antaŭ ol respondi!”

Diablo turniĝas ĉirkaŭe atendante novan proponon: “Ĉu vi konsentas ke ni semu brasikojn? Vi scias kiom belegaj kaj grandaj estos kapobrasikoj!”

Sanktulo jesas perkape, dirante: “Mi elektos ilin, do tion kreskantan super la tero.”

Diablo malice ridas: “Nu, kion mi faru kun verdaĵo? Mi volus rikolti tion kio kreskas subtere.”

Sanktulo nenion diras, ekpensante kiom malplenkapa Diablo estas; aŭ ĉu tio estas ia malracia Diabla afero?

Sanktulo diras post minuto da paŭzo: “Do, kaj tion ni solvis. Ĉu vi konsentas ke ni semu terpomojn!”

Diablo diras pli afable: “Jes. Mi elektos tion kio elkreskos super la tero. Mi ne volas erari ĉifoje.”

Sankta Savao respondas iom laciĝinte: “Bone, ne ridu. Ĉu vi ne konas la proverbon ‘Kiu lasta ridas, ridas plej bele’? Kion ni faros kun tritiko? Elekto estas via.”

Diablo diras: “Mi elektos tion kreskantan subtere. Ni semis erojn de tritiko.”

Sanktulo diras klarigante al li: “Ĉu vi forgesis? Kiam ni semas tritikon, post ĝia rikoltado la laboro ne estas finita. Ni devos ĝin alporti al muelilo por ricevi farunon. Al vi restos nur fojno.”

Diablo kolere ekkriaĉegas: “Mi ne volas plu kunlabori kun vi. Vi trompis min. Mi volas disrompi ĉi kontrakton!”

Sanktulo pace respondas: “Jen, lastafoje mi proponas al vi ke ni semu vinberojn. Ĉu vi deziras sukcon aŭ vinberajn surfundaĵojn?”

Diablo pripensis iomete kaj elektis. “Ja, mi finfine venkis vin. Mi prenos surfundaĵojn, aldonos akvon, kaj mi ĉion bakos en granda kaldrono. Do mi ricevos brandon!”

Sanktulo diras: “Mi ricevos vinon, kaj vi faros brandon. Vere vi venkis min.” Kaj li prenis siajn tri fingrojn por kruci sin.

Vidinte kion li faris Diablo ekfuĝas kolere kaj hontinde ekflustrinte: “Brando estas medikamento al maljunulo, sed furiozo al junulo.”



Sanka Savao  
(Serba sanktulo, ĉ.1175-1285 k.e.)

# SOLVO DE LA ENIGMOJ

*Aĝo de Manuĉelo*

**Donitaĵoj**

$$M = 3D$$

$$M + 3 = 2(D + 3)$$

$$D + x = M$$

**Solvo**

$$M = 3D$$

$$M = 2(D + 3) - 3$$

$$3D = 2(D + 3) - 3$$

$$3D = 2D + 6 - 3$$

$$3D = 2D + 3$$

$$3D - 2D = 3$$

$$D = 3$$

$$M = 3 \cdot 3 = 9$$

$$D + x = M$$

$$x = M - D$$

$$x = 9 - 3$$

$$x = 6$$

*Cerbotiklilo*

**Solvo**

La numeroj estas 2 kaj 14

Fakte, en ĉiu serio, por trovi la lastan numeron oni devas sumi ĉiujn ciferojn de la unuaj numeroj kaj la rezulton dividi (kiam la sago inklinas suben) aŭ multipliki (kiam la sago inklinas supren) laŭ la centra numero.

$$5+6+3+8+2+7+5 = 36 : 4 = 9$$

$$8+7+3+9+2+5+4 = 38 \times 2 = 76$$

$$2+5+2+6+3+4+8 = 30 : 5 = 6$$

Sekve:

$$4+9+3+7+2+6+1 = 32 \times 2 = 64$$

$$6+2+2+4+4+8+2 = 28 : 2 = 14$$

*Dusencaĵo*

*Fortega naneto !!*

**Solvo**

muziknoto LA

artiklo LA

# RAKONTO

## VIZITANTO

de Donald Broadribb

Kiam mi aŭdis frapon sur la pordon, mi skribantis artikolon por *Scientific American*, prestiĝa gazeto por kiu mi ofte verkas. Iom ĝenis min la interrompo, sed mi iris al la pordo kaj malfermis ĝin. Tie staris viro nekonata.

“Doktoro Konsilanto,” li diris, “ĉu mi rajtas? Mi deziras diskuti kun vi vian artikolon kiu aperis en *Sydney Morning Herald* hieraŭ.”

Mi hezitis. La nova artikolo por *Scientific American* profunde okupis min, kaj mi ne volis perdi mian pensfadenon. Ial mi ekpensis ke mi rekonas la vizitanton. Sed mi bone memoras vizaĝojn, kaj certe mi ne vidis tiun vizaĝon antaŭ nun. “Mi vere estas ne tre libera nunmomente,” mi diris. Tamen la vizitanto ŝovis sin preter min kaj enpaŝis.

Kutime mi proponas tason da kafo al miaj vizitantoj, sed mi ne volis kuraĝigi lin longigi sian viziton, do mi nur sidigis min sur seĝon kaj pergeste petis lin sidiĝi ankaŭ.

“Laŭ la ĵurnalo vi partoprenas en la SETI-projekto<sup>1</sup> serĉi signalojn de eksterteruloj,” la vizitanto diris.

“Kaj sendube vi volas montri al mi fotojn pri iu fluganta telero kaj informi min ke pasintasemajne trikapaj Marsanoj kidnapis vin,” mi diris malestime. “Min jam naŭzas tiom da kredemuloj sensciencaj. La telefono apenaŭ ĉesis sonoradi inter la publikiĝo de tiu artikolo en *Sydney Morning Herald* kaj nun. La ĵurnalo tute misraportis kion mi diris; laŭ mia opinio eksterteruloj ne ekzistas. Do, bonvolu foriri kaj ne plu ĝeni min.” Mi aŭtomate respondis, tre malĝentile pro la amaso da telefonaĵoj ĝenintaj min, sed samtempe mi ekkonsciis: lian voĉon mi rekonas, kvankam ne lian aspekton. Vere tro klare mi rekonas tiun voĉon.

“Vi miskomprenas min,” la vizitanto diris. “Ankaŭ mi ne kredas je ilia ekzisto. Tamen mi supozis ke vi kredas je ili, kaj mi volis seniluziigi vin pri tio.” Li ridetis, sed li parolis iom pli severe ol necesis. “Kaj mi ne komprenas kial, se vi ne kredas je eksterteruloj, vi partoprenas en la SETI-projekto.”

Eble vi, kiu legas ĉi tion, memoras ke frue en ĉi tiu jaro oni vaste diskonigis pri la projekto. Per radioteleskopoj oni esperas aŭdi signalojn senditajn el malproksimaj partoj de la kosmo. Multaj eminentaj astronomiistoj venis al Aŭstralio tiucele. Kaj multmilionojn da dolaroj oni elspezas por tiu projekto.

“Nu, kelkaj amikoj interesiĝas,” mi diris. “Kaj ili petis min raporti.”

“Konfidencan raporton, sendube,” la vizitanto diris. Mi sulkis la frunton kaj

---

<sup>1</sup> SETI = Serĉo je Ekster-Tera Intelektto.

la vizitanto tuj rimarkis tion. “Trankviliĝu, mi mencios ĝin al neniu,” li diris. “Tamen, mi bone scias ke vi estas la ĉefkonsilanto de Generalo X, kvankam verŝajne neniu alia ĉi tie scias tion. Kial tiu honorinda Generalo sendis vin interesiĝi pri SETI?”

‘Ne necesas ironii,’ mi pensis. ‘Ne nur vi rekonas min, ankaŭ mi rekonas vin. En ĉi batalo vi ne venkos, mi promesas al vi tion.’ Voĉe mi diris: “Nur pro hazardaĵo. Iuj Rusaj sciencistoj transdonis al ni arkivon en kiu estis raportoj pri signaloj aŭditaj dum ilia spacprogramo en la Sovetia epoko, sur frekvenco 1420. Ili kredis aŭdi strangajn signalojn, kaj volis ke ni konfirmu aŭ malkonfirmu ilian trovon.”

La vizitanto frotis sian mentonon. “Mi suspektis ke io tia eble okazis. Kaj ĉu vi do povis konfirmi ilian trovon?”

“Ne,” mi diris. “Ni zorge esploris la frekvencojn kiujn ili aŭskultis. Ilia sperto nur temis pri hazardaj kosmoradiaj bruoj.—Pardonu, mi malĝentilas. Ĉu al vi plaĉus taso da kafo?”

Mi ja devis ŝanĝi mian opinion ke ĉi tiu vizito ĝenas. Male, ĝi povos esti tre grava.

“Kafon? Mi preferas teon, se vi havas”, la vizitanto diris. “Tuj kiam mi ekgustumis teon mi ekamis ĝin.”

Mi iris al la apuda kuirejeto, kaj la vizitanto sekvis min. Evidente tre interesis lin rigardi la preparadon de la teo. Mi prenis tefolierojn el kesteto—“Mi ne ŝatas uzi la saketojn,” mi diris. Li aspektis tre konfuzita, kio ne min mirigis, sed mi ne eksplikis al li.—Ŝutinte la folierojn en poton mi enverŝis bolantan akvon. “Biskvitojn mi ne havas,” mi diris pardonpeteme. “Mi estas diabeta, kaj ne havas dolĉaĵojn en la domo.”

“Ĉu?” la vizitanto diris. “Ne gravas. “Mi preferas teon.”

Ĉu eble li ankoraŭ ne renkontis biskvitojn kaj supozis ke ili estas ia alternativa trinkaĵo? Mi sciemis pri tio, sed decidis ke estas plej dezirinde ne demandi.

Ni residiĝis, ĉifoje en komfortaj brakseĝoj.

“Do ĉio bona, ĉu? Vi ne bezonas timi.” La vizitanto videble estis malpli streĉita nun. Eble tia estis la efiko de la teo. Tanino tiel efikas je nekutimiĝinto.

“Ni ne bezonas timi,” mi konsentis. “Kvankam ni mem antaŭe kredis...” Mi hezitis. Ĉu mi menciu nian suspekton, kiu ne plu estis suspekto?

“Kredis kion?”

“Nu, en unu el la televidobildoj senditaj de la spacesplora ŝipeto Mariner 4, ĝuste antaŭ ol ĝi surgrundiĝis sur Marson—en unu el tiuj fotoj estis malklaraj oĵoj kiun iu ekzamenanto kredis tegmento de subgrunda misil-lanĉejo. Absurda supozo, kompreneble. Tial ni ne menciis ĝin al la ĵurnaloj. Sed ni volis certiĝi

ke ĝi ja estas absurda. Kelkaj el ni estas iom paranojaj — tro influigis de malnovaj rakontoj pri kaŝita Marsa civilizacio kiu pretiĝas ataki Teron. Plena absurdaĵo. Sed ni decidis ke en la sekva esplorŝipeto estu sent-aparatoj kapablaj trovi subgrundajn instalaĵojn. Kaj ia rimedo uzebla se montriĝus ke Marsanoj ja intencas ataki.”

Dum kelkaj sekundoj regis silento dum ni trinkis teon. Mi elverŝis duan tason por la vizitanto, ĉar tre rapide li plenglutis la unuan kiam mi diris tiun lastan frazon.

“Tiuj malnovaj rakontoj tamen estas stultaj,” la vizitanto komentis, post iom da medito kaj plia glutego da teo. “Kiam oni verkis ilin, oni kredis ke ekzistas kanaloj plenaj de akvo sur Marso, kaj ke ĝi estas tre aĝa planedo kun civilizacio laŭsupoze jam multmil jarojn daŭrinta. La spacesplorado kiun vi jam faris certe komprenigis vin ke neniuj kanalo, kun aŭ sen akvo, vere ekzistas sur Marso. Kaj rilate al Marsaj civilizacioj, mi scias ke via Orson Welles timigis la homaron per sia radiodramigo de la romano de H.G. Wells<sup>1</sup>, sed tio estis nur absurda elpenaĵo. Neniu serioze konsiderinda.”

“Nu, jes, vi parte pravas,” mi diris. “Mi diris al vi ke mi konvinkitis ke eksterteraj vivantoj ne ekzistas, nek povas ekzisti. Sed ni, ankaŭ mi, opiniis ke estus dezirinde povi unufoje por ĉiam nuligi tian minacon se ĝi, hipoteze, ja ekzistus.”

La vizitanto ekstremitis, plu trinketadis sian teon, kaj pensis.

Necesas diri ke ankaŭ mi mem tremetis. Kiel mi konvinkos ĉi tiun vizitanton ke mi seriozas?

La vizitanto nervoze ridetis.

“Eĉ Usonanoj kiuj elspezis miliardojn da dolaroj por la fiaska ‘Stelmilito’-projekto ne povus fari tion”, li diris, paŭzante dum sia rideto. “Kaŝita civilizacio sur Marso—se ĝi ekzistus, kaj mi certigas vin ke ĝi ne ekzistas—ja ne estus nuligebla de Teranoj.”

“Vi eraras pri la ‘Stelmilito’-projekto,” mi respondis, “tiom fiaska ĝi ja ne estas. Ni pruvos tion hodiaŭ mem.”

“Ĉu?” Li estis vere surprizita, kaj levis siajn brovojn dum tre evidenta tremado.

“Jes. Ni pruvos ĝin post nur du horoj. Samtempe kun alia eksplodo tre malproksima. Vi povos mem sperti kiom efika ĝi estas. Sendube kiam vi spertos ĝin, vi konsentos kun mi ke ĝi nepre ne estas fiasko.”

“Spertos?...” li paŭzis, hezitis, serĉis vortojn. “Jes, mi kredas kompreni. Sed...pro kio tia ‘pruvo’? Eĉ Usonanoj bezonas iun motivon.”

“Hipotezo,” mi diris. “Hipotezo. Hipoteze—ni supozu por nia hipotezo ke

<sup>1</sup> “Milito de la Mondo”, disaŭdigita en 1938 en Usono; poste en aliaj landoj.

ekzistas Marsanoj, kaj ke pravis la strategiistoj kiuj kredis trovi indikon pri subgrunda misil-lanĉejo sur Marso.”

“Eksterordinara hipotezo,” li diris.

“Aŭ eble ni prefere diru ‘ekstertera hipotezo,’” mi kvazaŭŝercis, sed nek mi nek la vizitanto ridetis nek ridis. “Nu, laŭ tiu nia hipotezo, ni konjektu ke tiuj Marsanoj atakas Teron. Ke estas aro da atakontaj spacoŝipoj jam ĉirkaŭ Tero.”

“Malfacile eĉ hipoteze konjekti tion,” la vizitanto diris maltrankvile. “Kian hipotezezan kialon vi havus por kredi tian situacion verŝajna?”

“Kialo eblas,” mi respondis. “Ankoraŭ tason da teo? Mi kredis ke jes.” Mi levis min, paŝis en la kuirejon, preparis plian poton da teo, kaj reportis ĝin. Intertempe, la vizitanto povis kontempladi la ‘hipotezezan’ situacion. Li ankaŭ kontemplis kelkajn elektronikajn aparatojn sur breto apud interna muro de la ĉambro.

“Speciala radioaparato?” li diris. “Ĝi estas iom nekutima. Konektita al komputilo.”

“Jes,” mi diris. “Konektita ankaŭ al la radioteleskopa centro. Hipoteze mi aŭskultadas Generalon Mapu.”

“Mapu?” la vizitanto diris. “Ĉu mi konas tiun nomon? Pri kio parolas tiu Generalo?”

“Hipoteze li estas la komandanto de la Marsaj invadantoj. Li parolas al aliaj spacoŝipoj.”

“Mmm, mi komprenas.” Li pensis. “Kaj, do, hipoteze, vi sukcesis deĉifri la Marsan lingvon?”

“Ankaŭ tion,” mi diris. “Hipoteze, ne estis malfacile.”

“Se vi diras.”

Videble la malkvietiĝo de la vizitanto plifortiĝis, kvankam li volis kaŝi ĝin. Mi ekrigardis mian brakhorloĝon.

“Mi vere ne disponas pri pli da tempo,” mi diris. “Bonvolu pardoni. Verŝajne vi scias nun kion vi bezonas scii.”

“Verŝajne.” Li levis sin, kaj rigardis mediteme la trafenestre videblan kamparan pejzaĝon. “Estus domaĝe, se hipotezaj Marsanoj volus detrui tiun belan vidaĵon.”

“Nu, ili ne faros tion,” mi diris. “Surprizatako detruos ilian atakŝiparon; kaj samtempe nukleaj bomboj nun orbitantaj ilian planedon ekeksplodos. Post precize du horoj. Domaĝe tiel detrui tutan mondon. Se eblus averti ilin, eble ili forvokus siajn spacoŝipojn kaj tiel savus sin.”

Dum la vizitanto trakuris la pardonon, mi vokis al li: “Kaj bonvolu transdoni miajn salutojn al S-ino Mapu, Generalo!”

Pacan dormadon, amikoj.



# PRI LA BESTO MIRMEKOBO

(Teksto Represita el Mirmekobo numero 4, 2009)

Mirmekobo [*Myrmecobius fasciatus*] en la angla lingvo nomiĝas *numbat*.

Longo de la korpo: 20–27 cm. Pezo: 400–700 g

Mirmekoboj estas marsupiuloj, ruĝ-brunaj ŝultre kaj kape. Sur la plejparto de la korpo la koloro estas nigra kun blankaj strioj. Ilia vosto estas ĉ. 17cm longa.

Mirmekoboj manĝas ekskluzive termitojn. Plenkreska mirmekobo bezonas manĝi ĝis 20 mil termitojn ĉiutage.

Mirmekoboj ne estas sufiĉe fortaj por mem rompi termitejon, do ili atendas ĝis termitoj troviĝas en facile atingebla loko. Tial la vivostilo de mirmekoboj estas intime ligita al la disirado de termitoj. Dum la somero mirmekoboj jam frue en la mateno videblas, sed ili rifuĝas al truo en ŝtupo aŭ truo en la tero kiam la tago varmiĝas, kaj atendas malpli varman parton de la posttagmezo por eliri kaj denove manĝi. Dum la vintro, kiam termitoj ekaktivis nur dum la malfrua parto de la mateno, mirmekoboj simile aktivadas. Nuntempe ili ekzistas nature nur en tre limigita parto de Okcidenta Aŭstralio, kaj en zooj.



## La Mirmekobo



Kiel besto, la Mirmekobo (*Myrmecobius fasciatus*) estas preskaŭ elmortinta en sia indiĝena teritorio. Sed en sia revua formo, ĝi estas internacie havebla per peto, kaj oni povas senpage aboni ĝin. Ni esperas ke vi enhejmigos ĝin, nutros ĝin per via legado kaj kontribuo de enhavo, kaj ĝuados ĝin.

Abono al la revuo estas senpaga. Ĉar neniu surpapere presitaj ekzempleroj ekzistas, neniu preskosto ekzistas. Tamen, se vi deziras mem per via komputla presilo presi ekzemplero(j)n, por vi mem aŭ por aliaj, tion vi rajtas fari senpage.

La revueto Mirmekobo estas sendependa, kaj subtenas neniun ismon. Artikolojn povas kontribui iu ajn. Tre bonvenaj estas literaturaĵoj: noveloj, poemoj, prozaĵoj iaspecaj; esprimoj de vidpunkto; historiaĵoj; prezento de interesaj hobiaj; biografiaĵoj, aŭtobiografiaĵoj; legendoj, mitoj... Bildoj, ĉu fotoj, ĉu desegnaĵoj, ĉu klarigaj, tre bonvenos.

Reklamojn, anonc(et)ojn, propagandon, lingvajn studojn aŭ kritikojn, pornografiajn, Mirmekobo malakceptas. La redaktoro rajtas akcepti, modifi, aŭ malakcepti ian kontribuon, kiun li opinias malkonforma al la karaktero kaj reputacio de la revueto. Korektojn evidente bezonajn li rajtas fari, konsultinte la verkinton.

© kopirajto apartenas al la verkinto de kontribuajo.

Represo de kontribuajo estas permesata, se permeson konfirmas ĝia verkinto.

Malnovaj numeroj de *Mirmekobo* troviĝas ĉe [www.gazetejo.org/mirmekobo](http://www.gazetejo.org/mirmekobo).

Ni atentigas ke la URL de la retejo de la redakcio estas: [http://web.me.com/donbroadribb1/donbroadribb1\\_Mirmekobo/](http://web.me.com/donbroadribb1/donbroadribb1_Mirmekobo/) Eblas ĉe tiu adreso elŝuti preskvalitan (5.5MB) eldonon de ĉi tiu numero de Mirmekobo.

Redaktoro: Donald Broadribb

*Adreso por ĉiuj komunikaĵoj, por peti ekzempleron, por sendi kontribuajon:*  
[mirmekobo@mac.com](mailto:mirmekobo@mac.com)